laŭ la fizikistoj de la kvantumoj l' Universo reduktiĝas je la ŜRUDINIĜERA ekvacio, kie interagas la PLANKA KONSTANTO h

ĉiuj FARIĜOJ de l' Universo estas supozataj prezenti solvojn de tiu mastra ekvacio


jen almenaŭ teorio, kiu alrespondas ĉion

kun tiu ekvacio kunligas karakteriza tempo t_p , la PLANKA TEMPO (*), kiu valoras $0,53 \cdot 10^{-53}$ sekundo. Fundamente neblas, helpe de la Ŝrudinjera ekvacio, priskribi fenomenon daŭranta tiun ĉiam malsuperan Plankan temperon t_p .

jen alia tubero ...

(*)/Vidu Aldonaĵon D



oni povus dedukti el tio, ke l' estanteco havas finian dikecon da tempo




oni ankaŭ povas diri, ke laŭ la kvantumistoj, la estinteco haltas je 10^{-43} sek. Ankaŭ ili ne povas koncepte imagi la tempon $t=0$

kaj finfine...

Bone, pri kia ni ekzakte parolas? Se l' Universo estas maŝino, kiuj estas ĝiaj esencaj funkciigantaj ĝin elementoj?




Skeme la konata Universo prezentigas, kiel miksaĵo de fotonoj kaj materiaj partikloj, proporcie unu miliardo al unu. La gravito kreas materiajn kunmetaĵoj, kie la UNUIGO daŭre konvertas materion al radiadon. La produktoj de tiuj reakcioj nomiĝas "atomoj" (*)




Tiuj produktoj de la NUKLEONSINTEZO povas reakcii inter ili, ĉu spontane, ĉu resorbante fotonojn (FOTOSINTEZO), produktante kunmetaĵojn nomataj molekuloj. La atomoj ankaŭ povas malkomponiĝi realsendante fotonojn (NUKLEA FUZIO)

ATOMOJ




MOLEKULOJ



FUZIO




(*) Vidu MIL MILIARDOJ DA SUNOJ



Materio kaj lumo estas nur du manifestiĝoj de sola kaj sama ento: l' ENERGIO-MATERIO kaj ĉiuj tiuj fenomenoj nur montras malrapidan rekonverton de parto de la materio sub formo de fotonoj

oni supozis je la komenco de la jarcento, ke la materiaj partikloj konservis nevarian dimension, t.e. ke l' energio-materio, kiun ili entenadis, egale konservigadis laŭ la tempo.



kiu estas tiu magia ligo inter la dimensio de la objektoj kaj ilia energio ?

vi ja scias, ke en kvantuma mekaniko ĉiujn la partiklojn oni konsideras kiel similaj al spacaj ondiĝoj, al ONDOPOJ. Laŭ difino, se E estas la kvanto de energio-materio veturata de la partiklo, l' ondolongo asociata estas:

$$\lambda = \frac{hc}{E} (*)$$




l' ondopo bildiganta partiklon de MATERIO konservas egale sian ONDOLONGON laŭ la tempo




la FOTONO sekvas l' ekspansion de l' Universo

(*) h : planka konstanto, c : lumrapido




materio kaj fotonoj, tiuj du formoj de l' **ENERGIO-MATERIO** ne transpasigas la kosman pluvastigon sammaniere



ha jes, materio estas **GLACIATA energio-materio (*)**

mallonge l' Universo do konsistas el materiaj grajnoj kaj fotonoj, kun multe da **MALPLENO** cirkaŭen



sed ne, Leon', la **MALPLENO**, tio ne ekzistas. En kvantuma mekaniko, l' Universo estas surfaco, kiu nenien "**GLATAS**". Kelkaj baldoj ŝajnas kiel amelataj kaj bildigas materion. Aliaj baldoj, la fotonoj, povas streĉiĝi kaj pro tio l' Universo ekspansiĝas

sed ... atendu ... se l' energio ŝanĝas, kiel l' inverso de la ondolongo, de la spaca pluiĝo de partiklo, tiam tiu streĉiĝo de fotonoj montras **KONTINUAN ENERGIPERDON** el la flanko de l' Universo ?!?




kaj evidentiĝas, ke ĉiuj fajfas pri tio




(*) Vidu **GRANDA EKSPLODO** pago 34

LA KOSMA EKSPANSIO




anstataŭ vivi en Universo kun konstanta entropio kaj kun variema energio evidente estus pli agrable vivi en l' inversa versio. Nu fine...



Se mi bone komprenas L' EKSPANSIO DE L'UNIVERSO estas samranga kun la plivastiĝo de la spaco enestita de la originaj fotonoj, kiuj konstituas la BAZON DE LA KOSMA RADIADO. En tiuj kondiĉoj l' Universo devus dilatiĝi

ĈIEN



nu, laŭ la astrofizikistoj, nek la suna sistemo, nek la galaksioj, nek la galaksiaroj dilatiĝas.

Fine, KIU PAGAS L'EKSPANSIPREZON ?!

nu, Sofio ?

hm ...



hm, ĉu la teoria kosmologio estas serioza afero, aŭ... ?



konklude, l' Universo
estas eble nenio alia ol iu gajno de
nia **IMAGO**



sed, Terezio, ne diru stultajojn. Kion vi opinias pri **EKSPERIMENTAJ
FAKTOJ**, pri la **OBSERVADOJ** ?? Seni kredas je la kosma ekspansio, estas
pro la **ŜOVIĜO RUĜEN**





Observu tiujn du spektrojn.
L'unuan oni produktis laborato-
rie de hidrogeno varmigita je alta
temperaturo. L'altra malkomponas
lumon senditan de malproksima
galaksio kaj montras gravan ru-
ĝendecon. Ekde tiuj **DONATOJ**, ni
deduktas ĝian **MALPROKSIMIĜAN
RAPIDON**. Kie staras l' imago en
tio ?

Kiel vi estas certa, ke tiun ŝoviĝon al la ruĝon, oni devas
atribui al la **DOPLER-FIZA** efiko ?




kaj al kio vi volas, ke tion,
oni devu atribui ? Pro laciĝo
de la lumo ?...

la kosmologiisto kaj filozofo **[MILNE]**, kiu
ribuzis tiun ideon ekspansivan de l' Univer-
so donis al tiu malaltiĝo de la fotona ofte-
co tute alian signifon



l' energio de fotono estas $h\nu$, kie h estas Planka konstanto kaj ν la ofteco. [MILNE] diris: "ni supozu, ke la fotona energio konserviĝas, sed ke h pligrandiĝas proporcie kun la tempo. Tiam oni mezuros, post la ricevo de la mesago, oftecon ν pli malfortan, sen Doplera efiko, sen ekspansio"



SENMOVA universo !

Mia kara, tio ne entenas. Kion vi diras, pri la fosilia radiado, spuro de la PRAA EKSPLODO ?

jes, bone, tiam ni revenu al ekspansianta universo, sed rilate al KIO ?

Ĉu estas KOSMOLOKO ? (*)

sensencaĵo ! La entenanto kaj la entenato de la universo estas nur unu sola kaj sama objekto. Unurura kalkulo gravigas la mezuron de la ŝoviĝo al la ruĝo.

Ĉiamaniere oni tute ne antaŭvidas tri por mezuri surloke objektojn, kiuj staras post miliardoj da lumjaroj. La tuta afero kuŝas en tio, ke oni devas konstrui **SISTEMON DE BILDIGOJ**, kiu akceptinde prenis en kalkulon la observojn. En Scienco oni povas nur esperi por

SAVI LA ŜAJNOJN




(*) Laŭlitere: "La loko, kie troviĝas l' Universo"

GAŬĜA MODELO (*)




Ni vidu: kiam oni volas imagi al si ekspansivantan universon, oni ĝenerale prenas la bildon de la balono, kiun oni ŝveligas, kun supre desegnitaj makuletoj, bildigantaj la amasojn de galaksioj





Ne, la klasika modelo ne tiele aspektas



necesas, ke vi fiksu sur via balono memglueblajn pasteletojn, ĉar oni ne supozas, ke la galaksiaj amasoj dilatiĝas dum la tempa fluo



tiu-okaze la kosma ekspansio respondas al la ĉi-subaj desegnoj



(*) INTERPRETO DE KOSMOLOGIA MODELO KUN VARIEBLA LUMRAPIDO

J.P. PETIT: Modernaj fizikaj Leteroj A Vol.3 N°16 (1988) paĝ. 1527-1532

KOSMOLOGIAJ MODELOJ KUN VARIEBLA LUMRAPIDO. INTERPRETO DE ŜOVIĜO AL LA RUĜO: J.P. PETIT, Modernaj fizikaj Leteroj A Vol.3 n°18 (1988) paĝ. 1733-1744

kial ĉiuj universaj objektoj ne grandiĝas kune kun ĝi : la galaksioj, la sunsistemo, la elementaj partikloj ?

juna amiko mia, la grandeco de tiuj objektoj determiniĝas el certa nombro da konstantoj : la gravita G , la Planka h , la protona maso m , la lumrapido c

Ĉio-ĉi estas bone konata, vi ja pensas...

sed kial tiuj kvantoj G , h , m , c estas nevariaj ?


sed ĉar ili ne varias ...

de tago al l' alia, de ekstremo de la Tero al l' alia, certe, sed kial tiuj grandecoj ne variis dum miliardoj da jaroj ?

mi supozas, ke la lumrapido c devas resti konstanta pro la Ĝenerala Relativeco ...

Tio skribiĝas absolute nenien ...

Be, ĉu veras ?




kaj pri la Planka konstanto h ? Ĉu ĝi ne povas varii... pro la kvantuma mekaniko?

ankaŭ tio estas nur alia hipotezo ligita al tiu **SISTEMO DE BILDIGOJ**

sed ... ja estas **AKSIOMOJ** !?!

aksiomo estas nur kredoĵo kun blanka kitelo kaj kravato

Komence de la lasta jarcento, oni povis precize mezuri tiujn kvantojn, kiuj ludis rolon en la ekvacioj, kelkajn, oni eĉ firmeme malkovris en tiu epoko. Kaj poste, ĉu nevortigita **KONSENTO** stariĝus, kiu volus kredi ilian **ABSOLUTAN KONSTANTECON** ?



Kio ŝanĝas, Leon' ? Homoj ĉiam volis enfermi l'Universon en iliaj nuntempaj revoj. Estis la famaj Platonaj pluredroj (*), la kvar elementoj. Hodiaŭ estas la ... konstantoj de la fiziko

Atentu, ne iu tiel rapide ! Oni montris, ke se ni tuisus kelkajn fizikajn konstantojn, postsekous aferoj, kiuj kontraŭdiradus la observojn !

jes, sed se oni rigardas, ke ĈIU tuj konstantoj varias en la tempo, inkluzive la LUMRAPIDON ?

Skorzonero!
la lumrapido...




Se vi permesas la konstantojn, ke ili varias dum la tempo, se vi "liberigas" ilin, vi ankaŭ devos krei tiom da novaj fizikaj leĝoj por redoni al la scienca konstruo ĝian solidecon

SUPERA RELATIVECO


Mi trovis solvon : ni postulos nur la ENERGIAN KONSERVADON, ne plu masan, kaj supozante, ke la objektoj de l' universo DILATIĜAS KUN ĜI

ĈIU objektoj, t.e. la galaksioj, la sunsistemo, la nigraj vorticoj kaj ankaŭ la protonoj, la neŭtronoj

la objektojn, oni desegnis sur la balono



Efektive, vi ricevas nefinian lumrapidon je $t=0$, kiu poste daŭre malpligrandigas (*). La maso kreskas, sed l' energio mc' restas konstanta. La gravita konstanto varias kiel l' inverso de la maso... kaj ĉio-ĉi solvas la ekvacion de la ĜENERALA RELATIVECO, la famegan EINSTEJNAN EKVACION



$$G = \lambda \gamma$$

$$\Delta \phi^2 = (\Delta x)^2$$

$$- c^2 \Delta t^2$$

$$= \frac{1}{2} \lambda \gamma \frac{1}{c^2}$$



nekredeblas?!)

tiu Universa modelo estas monstro, ĥimero. Kiel vi elturniĝas kun la ŝoviĝo al la ruĝo?




Estas malicege!

rigardu! jen la solvo: oni trovas, ke la planka konstanto varias kiel t , do tio kongruas kun la ideo de Milne (p. 65)

Ni vidu... La fotono elsendiĝas kun certa ENERĜIO $h\nu$, kiun ĝi konservas. Dum la vojaĝo, la Planka konstanto h pligrandiĝas, do la ofteco ν , kia ĝi mezuriĝos je la ricevo, malsamos (**)


Hm ... stranga afero!...




kŭak!



(*) en tiu modelo la lumrapido varias kiel $\frac{1}{\sqrt{t}}$
 (***) la ŝoviĝo $\Delta \nu$ de la ofteco estas proporcia je la distanco al la fonto. Oni retrovas la HUBLAN LEĜON




sed ... se tiun ŝoviĝon la Doplera efiko kreas je la malprograsa rapido de la fontoj, tiam l' Universo ne plu estas ekspansiva, ĉu ne ? mi nenion plu komprenas..



oni fajfas pri tio ! Kio gravas, estas ke ni retrovas l' observeblon, tiu ŝoviĝo ruĝen. En tiu modelo vi ne plu povas MEZURI ajnan ekspansion, ĉar tiam via rubanda metro samtempe dilatiĝus ol l' Universo

same vi ne povas LOKE evidentigi variadojn de h , c , G , m , ktp... ĉar la mezuriloj, bazataj per la samaj konstantoj, derivas "paralele"




ĉi-teme, kio iĝas l' ENTROPIO ?

ĝi pligrandiĝas laŭ la tempo t (*) kaj la paradokso de la 36-a paĝo malaperas



kaj tiu fama PRAA NEFINIAĴO je $t = 0$, pri kiu oni tiom parolas, kion ni pridivus pri tio ?

(*) en tiu modelo l' entropio S varias kiel $\text{Log } t$ (Aldonaĵo F) 70



se oni interŝanĝas la **KRONOLOGIAN VARIANTON** t kontraŭ l' **ENTROPIO S**, la nefinitaĵo ne plu ekzistas, ĉar tiu laŭdira "KOMENCA MOMENTO" tiam respondas je $S = -\infty$ (*). La demando pri la stato de l' Universo **ANTAŭ** la proa eksplodo ne plu havas sencecon





tio signifus, ke la **TEMPO** ne estus la ĝusta **VARIANTO** por priskribi la **OKAZAĴOJN** sed ia iom iluzia miraĝo



ĉar oni nun atakas la paradoksojn, ni vidis en paĝo 36, ke ni ne sciis, kiel klarigi la ŝajnan malordon kaj la rimarkindan homogenecon de l' Universo, ĉar, en ĝia juna aĝo, la partikloj tute ignoris sin.



tiuj partikloj elsendis lumajn ondojn, je rapido c kaj tempo $t = 0$, sed ili malproksimiĝas tiel rapide unuj el la aliaj, ke iliaj "**HORIZONO-SFEROJ**" ne interpenetras sin. Ili staras en plene **AŬTISMA** (*) stato



kontraŭe, en la **SUPERA RELATIVECO** la horizonsferoj interpenetriĝas je ĉiuj epokoj (ili pligrandiĝas je la sama rapido ol l' Universo mem La partikloj interagas. **MALORDO** kaj **HOMOGENECO** troviĝas pravigataj de tio

(*) Psikiatrio : totala malĉeesto de komunikado kun l' aliajtoj

kaj la Planka tempo, restas tamen problemo! Vi ne povas sentiĝi je ĉiuj tiuj paradoksoj?!?

ni vidu, tiu tempo valoras: $\sqrt{\frac{hG}{c^3}}$
sekundon, mi rigardas ...

la Planka tempo varias, kiel ...t!
la Planka baro malaperas (*)



Ĉu alia afero?

GRMBL...

Tinegio, kie estas Anselmo?

Mi opinias, ke li estas tie supre


(*) Vidu Aldonaĵon F






La moderna scienco famas pro konstruiĝo ekde terure malsimplaj ekvacioj, kiujn povas kompreni nur tre malgranda nombro de "Dikaj kapoj". Sed la fundamentaj ideoj ĉiam estas tre simplaj kaj oftas, ke oni povas ilustru ilin per perfekte valida maniero helpe de kalkuloj, kiuj similas al tiuj de la spicvendistoj.

la notoj, kiuj sekvas prezentas ekzemplojn



ALDONAĴO A

aŭ kiel trovi la evolua leĝo de l' Universo per tri linioj da kalkulado




Ni similigu l' Universon al homogena grumelo da polvo, kun radiuso R kaj maso M . Ni rigardu polvan grajnon kun maso m , kiu situas ĉe ĝia surfaco. Oni povas montri, ke la forto, kiu efikas kontraŭ tiu maso estas la sama, ol tiu, kiu produktus la tutan mason M , densigata en la

centro O , t.e. $F = -\frac{GMm}{R^2}$. Ni apliku formulon $\vec{F} = m\vec{a}$ de la meĥaniko.

Sekvas, ke: $-mR''R^2 = GMm$ aŭ $R''R^2 + GM = 0$ alie dirate la faman [FRIEDMAN]-an EKVACION. Ni konstruu un el la tri solvoj de tiu diferencialekvacio. Ni formigu la funkcion $R(t)$, kiel at^b , kie a kaj b estas du konstantoj por determini ilin. Do, $R = at^b \Rightarrow R' = abt^{b-1} \Rightarrow R'' = ab(b-1)t^{b-2}$. Tiam oni metas en l' ekvacio kaj oni ricevas: $b(b-1)a^3t^{3b-2} + GM = 0$, kiu "funkcios", kia ajn estas t . Sola solvo estas, kiam la t -potenciganto devas esti nula, do kiam $b = \frac{2}{3}$, kaj sekve $a = \sqrt[3]{\frac{9}{2}GM}$ kaj $R = \sqrt[3]{\frac{9}{2}GM} t^{2/3}$

$R(t)$ estas la karakteriza longo de tiu universo, l. kiu povas asimiliĝi, ĉu je ĝia u -a kurbeca radiuso, ĉu je la meza distanco inter du partikloj.




ALDONAJO B



L'aŭtisma universo

Simpla ekrigardo al la kurbo $R(t)$ montras, ke la ekspansio de la universo komenciĝis per eksplodo, kaj poste malakceliĝadis.

Se oni konsideras $R(t)$ simila al la meza distanco inter du partikloj, ct montras la radiuson de elektromagneta ondo elsendita je la tempo $t = 0$. Kun konstanta lumrapido, oni vidas, ke la radiuso de tiu "horizonto-sfero", aŭ sfero de la scieblo, restos dum certa tempo mal-supera je la meza distanco inter la partikloj, kiuj komplete ignoras la aliajn dum tiu periodo.



ALDONAJO C

R M



kiel kalkuli la radiuson de NIGRA TRUO?


Ni konsideru astron kun radiuso R kaj maso M kaj ĉe ĝia surfaco alian mason m . Imagu, ke tiu-ĉi estas raketo. La energio, kiun ĝi kapablos foruzi, ne povos superi mc^2 , nome: ĝian energian ekvivalenton. Ni nun kalkulu la energion elspezendan por eltiri tiun-ĉi mason m el la gravita

kampo de la astro. La forto estas $F = -\frac{GMm}{r^2}$. La laboro estas $-\frac{GMm}{r^2} dr$, kie dr estas eta delokiĝo.

Necesos foruzi energion $E = -\int_R^{\infty} \frac{GMm}{r^2} dr = \frac{GMm}{R}$

Tiu energio superos la maksimuman mc^2 energion disponeblan, se $\frac{GMm}{R} > mc^2 \Rightarrow R < \frac{GM}{c^2}$ (Radiuso de Ŝvarcŝilda). Pli

fajna kalkulo, priatentanta la malkreskon de maso m , kondukus al la ekzakta valoro $R_s = \frac{2GM}{c^2}$. Se maso M enteniĝas ene de sia ŜVARC-SILDA radiuso, neniu objekto povos eliri el ĝi, ĉar tio postulus energion superan al mc^2 . La suna Ŝvarcŝilda radiuso estas 3,7 km longa.



La fotono havas energion $h\nu$. Ĝi ekivalentas materikvanton kun maso $m_{\text{f}} = \frac{h\nu}{c^2}$; tio ebligas kalkuli la energion necesan por eltiri ĝin, tio estas $-\int_R^{\infty} \frac{GMm_{\text{f}}}{r^2} dr = \frac{GM}{Rc^2} h\nu$. La energio de fotono, kiu sukcesas forlasi la astron estas : $E' = h\nu (1 - \frac{GM}{Rc^2}) < h\nu$ (jen la fenomeno de gravita ruĝensoviĝo).

Se $R < \frac{GM}{c^2}$, la astro ne plu povas elsendi lumon, ĝi estas nigra truo.

ALDONAĴO Ĉ



kaj nun ni pasu al Plankaj kondiĉoj

La spacan ekspansion de partiklo kun maso m oni kalkulas kiel KOMPTONA longo $\lambda_c = \frac{h}{mc}$. Ni supozu, ke la partiklo estu nigra truo. Tiam, tiu longo λ_c devos identi kun la Ŝvarcsilda radiuso, t.e. : $\frac{h}{mc} = \frac{GM}{c^2}$, rezultas $m_{\text{f}} = \sqrt{\frac{hc}{G}}$, kio valoras 10^{-5} gramo. Ne povas ekzisti pli peza partiklo. Ĝia radiuso tiam estas $\frac{h}{mc} = \frac{h}{c} \sqrt{\frac{G}{hc}}$ [do $L_p = \sqrt{\frac{hc}{G}}$] estas la PLANKA LONGO : $1,6 \cdot 10^{-33}$ cm. Nenio pli malgranda povas ekzisti en l' Universo

estas la elementa maso de la spaca pulovero




Prenu fotonon kun ondolongo $\lambda = \frac{c}{\nu}$. Ĝia energio estas $E = \frac{hc}{\lambda}$ kaj ĝia samvalora maso $m_{\text{f}} = \frac{E}{c^2} = \frac{h}{\lambda c}$. Ĝia Ŝvarcsilda radiuso estas $R_s = \frac{Gm_{\text{f}}}{c^2} = \frac{Gh}{\lambda c^3}$, kiu egalos sian ondolongon, se $\lambda = \sqrt{\frac{hc}{G}} = L_p$

Kiam la ondolongo de fotono egalas sian Ŝvarcsildan radiuson, ĝi nur turniĝas, kvazaŭ hundo, klopodanta kapti sian voston kaj eĉ la inforno ne plu povas cirkuli. Tiu ondolongo respondas al la tempo $t_p = \frac{L_p}{c} = 0,54 \cdot 10^{-42}$ sekundo.

estas la DIKECO DE LA ESTANTECO


aŭ la dikeco de la paĝoj de la libro



ALDONAJO D


LA RELATIVECA SPACO DE FAZOJ

Ĝi estas kurba, samtempe en pozicio kaj en rapido. Oni limiĝos je unu pozicia dimensio kaj unu rapida dimensio. La pozicion oni markos per la signo θ kaj la rapidon per ϕ . Por senmova observado la delokiĝo de objekto kun rapido V estas $d = R \theta$ kaj la rapido ligos sin kun la angulo ϕ per la rilato $V = c \sin \phi$. Por tiu observado la fotonoj cirklo-iras cirkau la polusoj kaj ili sekvas vojinojn kun nula longo (vidu "ĈIO RELATIVAS").





Estu $\overline{M_1 M_2} = R \theta$ delokiĝo, sensita de ripozanta observado. En la spaco de la fazoj la reala delokiĝo respondas la arkon $\overline{m_1 m_2}$, kiu projekcias sin laŭ la arko $\overline{n_1 n_2}$ en la ekvatora ebena. La segmento $\overline{O n_1} = R \cos \phi$. La arko $\overline{n_1 n_2} = \overline{O n_1} \theta$. Kiel $\cos^2 \phi + \sin^2 \phi = 1$ kaj $\sin \phi = \frac{V}{c}$ ni ricevas $\overline{m_1 m_2} = \overline{M_1 M_2} \sqrt{1 - \frac{V^2}{c^2}}$, kio estas nur la fama KUNTIRIĜO DE LORENTZO. En la spaco de la fazoj la tempo ne estas libera variabla.

La PROPRA TEMPO kalkuliĝas. Ĝi proporcias kun la arko $\overline{T_1 T_2}$, projekcio de la arko $\overline{m_1 m_2}$ sur la tanĝanta ebena al poluso.



La PROPRA TEMPO kalkuliĝas. Ĝi proporcias kun la arko $\overline{T_1 T_2}$, projekcio de la arko $\overline{m_1 m_2}$ sur la tanĝanta ebena al poluso.

$$t = \frac{\overline{T_1 T_2}}{c} = \frac{R \theta \cot \phi}{c}$$



$$v = c \frac{R \cos \phi}{R \cot \phi} = c \sin \phi$$

ALDONAJO E


LA SUPERA RELATIVECO

- * Oni "redonas ilian liberecon" al ĉiuj "konstantoj" de la fiziko.
Ekzemple: G , konstanto de la gravito, h planka konstanto, c lumrapido, m maso de la protono au neŭtrono.
- * En la ekuacio de la ĝenerala Relativeco la EINSTEJNA konstanto $\chi = \frac{8\pi G}{c^2}$ estas ABSOLUTA KONSTANTO. Do $G \approx c^2$
(\approx signifas "varias kiel")
- * Oni supozas, ke la energio mc^2 konserviĝas laŭ la tempo, m estante la maso de la senmova partiklo.
- * Oni supozas, ke la galaksioj, la suna sistemo, la nigraj truoj, la protonoj kaj la neŭtronoj "grandiĝas" samtempe kun la Universo, kies perimetro oni prenas egala al $2\pi R$.
Ni skribu: la radiuso de la Nigra Truo (Ŝvarcŝilda Radiuso) grandiĝas kiel $R \Rightarrow \frac{Gm}{c^2} \approx R$, car $\frac{G}{c^2} = Kto \Rightarrow \boxed{m \approx R}$
kiel cetere $mc^2 = Kto$:

$$Rc^2 = Kto$$

$$\boxed{c \approx \frac{1}{\sqrt{R}}}$$

$$\boxed{G \approx \frac{1}{R}}$$



Ni prenu du stelojn kun sama maso, orbitante ĉirkaŭ de ilia gravita centro laŭ cirkla vojino kun radiuso r .

La decentra forto estas $\frac{mV^2}{r}$, la gravita reciproka altiro estas $\frac{Gm^2}{4r^2}$. Se r varias kiel R , tiam $\frac{Gm^2}{R^2} \approx \frac{mV^2}{R}$ de kie $\boxed{V \approx \frac{1}{\sqrt{R}}}$. La rilato $\beta = \frac{V}{c}$ konserviĝas laŭ la tempo, tute kiel la energio $E = \frac{mc^2}{\sqrt{1 - \frac{V^2}{c^2}}}$. La spaca etendiĝo de la protono donita de sia Komptona longo $\frac{h}{mc} \approx R$, oni havas: $\boxed{h \approx R^{3/2}}$

La solvo de la EINSTEJNA ekuacio, supozante la universon homogenan kaj izotropan (laŭ la metriko de Robertson-Walker) venigas nin al la diferenciala ekuacion:


$$\frac{2R''}{R} + \frac{R'^2}{R^2} (2 + \beta^2) + \frac{kc^2}{R^2} (1 + \beta^2) = 0$$

kie $v = \beta c$ estas la rapido de galaksia agitado en tiu "kosmologia fluidajo". Serĉante solvon en speco $R = at^k$, oni vidas, ke β forblas kaj $k = -1$ donas solvon $R \approx t^{2/3}$. K estas la kurba indico. Do tiu universo havas negativan (*) kurbecon. La kosmologia horizonto difiniĝas de la integralo $H = \int_0^t c(t) d(t)$. Oni trovas $H \equiv R(t)$.

Do la universa samspececo ĉiam troviĝas pravigata.

La entropio igas $S \approx \text{Log } t$. En priskribo, kie la entropio anstataŭigas la temporan variablon la komenca malreguleco malaperas, pure kaj simple.

Ĉiuj fizikaj ekuacioj (Ŝredingera, Maksvela, Bolemana) estas nevariaj per la akiritaj transformoj.



Oni trovas, ke la RUGENŝOVIĜO proporcias kun la distanco (Leĝo de Hubble). Gis kelkaj miliardoj da lumjaroj la distancoj kalkulitaj por la fontoj estas preskaŭ identaj je la distancoj eliritaj el la klasika modelo. La fotona energio $h\nu$ oni supozas konservanta (kiel ĉiuj energioj), kiel $h \approx t \Rightarrow \nu \approx \frac{1}{t}$, la rugensoviĝo ne plu estas la sekvo de la Doplera efiko sed rezultas de la multjarcenta derivado de la Planka konstanto.

En 1988 BARTHEL K. MILEY (en *Naturo* vol. 333, majo 1988) montris, ke, ju pli la kvazaroj estas malproksime, des pli ili estas malgrandaj. Tio akordigas kun la modelo, kie la kvazaroj "grandiĝas" kun la Universo mem.

(*) Vidu "La GEOMETRIUMO"-n kaj "LA NIGRA TRUO"-n (Eldonoj Belin) 79

Ĝis nun la Anselma modelo
ne kontraŭdiras observeblan
fakton...

kaj tio funkcias eĉ pli bone
ol la klasika modelo
por la kvazaroj...

kaj via opinio, Sofio, kiu ĝi estas?

La Anselma modelo ne estas sen manko. Res-
tas aliaj konstantoj ligitaj al nukleaj procezoj kaj
necesas, ke li elpensu manieron por ilin variigi por povi
raporti pri tiuj fenomenoj, kiuj estas ankaŭ parto de
la kosmologio.

aŭ ekaperos tu kontraŭdiro.
Kaj tiam, pumlala!

Li tute certe akre
serĉas la solvon...

Ĉu?...

Nota:

Kial la entropio (en unu partiklo) varias kiel la logaritmo de la hipervolumeno kun 6 d. de la sistemo en la spaco de la fazoj

n = nombro de partikloj en volumena unuo

m = maso de unu partiklo

T = absoluta temperaturo

$$\vec{v} \begin{cases} u \\ v \\ w \end{cases}$$

v = modulo de la rapido de termika agitado

$$f = n \left(\frac{m}{2\pi kT} \right)^{3/2} e^{-\frac{m(u^2+v^2+w^2)}{2kT}} = n \left(\frac{m}{2\pi kT} \right)^{3/2} e^{-\frac{mv^2}{2kT}}$$

distribuo de Maksvelo-Bolemano je la termodinamika ekvilibro

difino de la entropio en unu partiklo s

$$S = -k \int_{-\infty}^{+\infty} du \int_{-\infty}^{+\infty} dv \int_{-\infty}^{+\infty} dw f \log f = -k \langle \log f \rangle$$

$\langle A \rangle$ = "stokasta" meznumero

$$\langle \log f \rangle = \log \left(\frac{m}{2\pi k} \right)^{3/2} + \log \frac{n}{T^{3/2}} - \frac{m}{2kT} \langle v^2 \rangle$$

$$\langle v^2 \rangle = \int_{-\infty}^{+\infty} du \int_{-\infty}^{+\infty} dv \int_{-\infty}^{+\infty} dw (u^2+v^2+w^2) \left(\frac{m}{2\pi kT} \right)^{3/2} e^{-\frac{m(u^2+v^2+w^2)}{2kT}} = \frac{2kT}{m}$$

$$S = k \left[\frac{3}{2} \log \left(\frac{2\pi k}{m} \right) + 1 \right] + k \log \frac{T^{3/2}}{n} \approx \log \frac{T^{3/2}}{n}$$

konstanto meza rapido de termika agitado $\langle v \rangle \approx \sqrt{\langle v^2 \rangle}$

$n \approx \frac{1}{L^3}$, kie L estas la karakteriza dimensio de la spaco ekspansio

$T \approx \langle v^2 \rangle \frac{m}{2} \approx \langle v \rangle^2 L^3$ karakteriza volumeno de la sistemo en la spaco de la fazoj. Kio venas al:

La entropio en unu partiklo varias, kiel la logaritmo de la sistemo volumeno en la spaco de la fazoj, sia hipervolumeno 6 d.

La Direktorejo